

**1a sesio**

29-a de decembro 2018, 15a-17a

2 horoj

Tagordo (survoje amendita):

https://docs.google.com/document/d/11Pm22n969ij5NBwlooVuRxFFb-Eb53y_Ung14IC4_A4/edit

Ne necesas alekti kunsidestron, ĉar la enrete elektita kunsidestro, Luis Obando, ĉeestas.

Ĉeestas el la estraro: Léon, Francesco, Tuška, Feliĉa, Olga, Hans, Arturo.

Ĉiuj enkondukas sin kaj koncernajn anstataŭatojn.

Ĉeestas 19 komitatanoj kaj 7 estraranoj. Kворumo estas garantiita.

Kunsidestro Luis enkondukas elekton de voĉdona komisiono.

→ **Estas unuanime elektitaj Vit kaj Veronika.**

La komitato elektas proponan komisionon.

→ **Estas unuanime elektitaj Karina kaj Roĉjo.**

Propono de MB:

"La Komitato de TEJO ŝovas la realigplanon al la kvina punkto de la dua sesio."

21 por, 1 kontraŭa, 4 sindetenoj → Akceptita

Printitaj versioj de gravaj dokumentoj traktotaj dum la venonta komitatkunsido estas disdonataj: buĝeto 2019, dummandata agado ekde IJK 2018 kaj realigplano 2019, financa raporto 2017.

Léon rakontas pri la situacio pri Ĝojo, kaj diras ke de ŝi ja fine venos raporto pri ŝia agado. Léon kaj Francesco rakontas pri la agado de la estraro ekde IJK 2018. Olga rakontas pri KER-agado ekde IJK. Hans rakontas pri sia agado, ĉefe pri sia kunlaboro kun USEJ nome de TEJO por prizorgi la junlaran programon de UK 2020, pri siaj klopodoj trovi bonajn komisiitojn (Querino NETO por Landa Agado kaj Karina OLIVEIRA por Edukado/rilatoj kun ILEI), kaj pri siaj ĝeneralaj taskoj en la estraro rilate provlegadon kaj korektadon de TEJO-dokumentoj. Konstanze resumas sian agadon ekde IJK, ĉefe rilate al ĝenerala gvidado de la organizo, KER kaj voĉdonoj, pardonpetante pro tio, ke ne eblis okazigi voĉdonadon por Komitatanoj B, pro teĥnikaj kialoj, antaŭ la komenco de JES.

Francesco rakontas pri la situacio pri dungoj kaj volontuloj de TEJO.

Feliĉa rakontas pri la TEJO-apartamento kaj ĝia financa situacio.

TEJO pagas po 942,54 EUR monate por luokosto, 31 EUR monate por akvokosto, 41,5 EUR monate por interretokosto, 65 EUR monate por energiokosto, entute -1080,35 EUR monate. Estas 3 luitaj ĉambroj en TEJO-apartamento al membroj de TEJO kun sumo de luokosto 1270 EUR, do TEJO gajnas po 189,65 EUR monate.

Feliĉa prezentas la bilancon por 2017.

https://drive.google.com/file/d/1MJS-WlszN7T6g796rP_uOEDZ7eAHoFzO/view?usp=sharing

Sekve, estas petite al la komitato libere raporti pri sia agado al la estraro.

Tiucele, Roĉjo komunikas ke NEJ, JEFO kaj Verdaj Skoltoj ne organizos FESTOn kiel anoncite pro tio ke malfacilis trovi taŭgan ejon ĝis JES.

Konstanze enkondukas la [realigplanon](#) por 2019 kaj la tuta estraro prezentas ĝin.

La horo estas 17:00 kaj venas propono:

"La Komitato plilongigas la unuan sesion ĝis la 17:15."

23 por, 0 kontraŭa, 0 sindetenoj → Akceptita

Feliĉa prezentas la buĝeton por 2019.

<https://docs.google.com/spreadsheets/d/1VMHkNfKxo1ElczvuxVUrKKR4X9zplRXDmwXJGLx9lvvg/edit?usp=sharing>

Francesco prezentas proponon pri dungo de Roy McCoy.

Estas 17:15 kaj denove venas propono:

"La Komitato plilongigas la unuan sesion ĝis la 17:55."

20 por, 4 kontraŭ, 0 sindetenoj → Akceptita

2a sesio	30-a de decembro 2018, 11a-14a	3 horoj
-----------------	--------------------------------	---------

Luis malfermas la sesion.

Ĉeestas el la estraro: Léon, Francesco, Tuŝka, Feliĉa, Olga, Hans, Arturo.

Propono de Roĉjo:

"La Komitato aldonas al la tagordo antaŭ punkto 1 punkton "Dungo de Roy McCoy"."

25 por, 0 kontraŭ, 1 sindeteno → Akceptita

Propono de Roĉjo:

"La Komitato aldonas al la tagordo antaŭ la buĝeto punkton "Bilancio de Financa Raporto 2017"."

23 por, 0 kontraŭ, 1 sindeteno → Akceptita

Punkto (1): Dungo de Roy McCoy

Procedura propono de Roĉjo:

"La Komitato decidu tuj voĉdoni pri la dungo de Roy McCoy."

22 por, 2 kontraŭ, 2 sindetenoj → Akceptita

Sekreta voĉdono:

"La Komitato aprobas, ke TEJO dungu Roy McCoy por 5 elcentoj de plentempa laboro."

11 por, 12 kontraŭ, 3 sindetenoj → Malakceptita

Punkto (2): Eventualaj proponoj pri amendoj al la statuto

Ne alvenas proponoj.

Punkto (3): Eventualaj amendoj al la reglamento

Punkto (3.A): Amendoj al Komitata Reglamento proponitaj de Rogier (diskutado kaj voĉdonado)

Voĉdonado pri unua paĝo:

"La Komitato bloke aprobas la 1-an, 2-an, 5-an, 6-an kaj 7-an proponon de Rogier pri ŝanĝo de la Komitata Reglamento."

23 por, 0 kontraŭ, 1 sindeteno → Akceptita

Voĉdonado pri dua paĝo:

"La Komitato ŝanĝas la punkton 7.2 de la Komitata Reglamento de "Por ĉiu labororgano la Estraro aŭ la kunvokinto proponas liston de membroj, kiun la Komitato eventuale modifas ĝis ĝi akceptas la proponon." al "Por ĉiu labororgano la Kunsidestro surloke petas kandidatiĝojn, kaj la komitato grupe akceptas aŭ malakceptas la kandidatojn, krom se du komitatanoj postulas sekretan voĉdonon laŭ artikolo 14 de la reglamento."."

23 por, 0 kontraŭ, 1 sindeteno → Akceptita

Amendo al amendo de MB:

"La Komitato forigas el la Komitata Reglamento en la punkto 9.2.C "Mandata Komisiono". La Komitato decidas tuj voĉdoni pri starigo de laborgrupo Voĉdonoj."

24 por, 0 kontraŭ, 0 sindetenoj → Akceptita

Procedura propono de MB tuj voĉdoni pri sekva punkto

22 por, 3 kontraŭ, 1 sindeteno → Akceptita

Propono de MB:

"La Komitato starigas laborgrupon Voĉdonoj, kiu prezentu proponon plej malfrue ĝis la 17-a de aprilo 2019."

22 por, 0 kontraŭ, 4 sindetenoj → Akceptita

La laborgrupo pri voĉdonoj konsistas de:

Roĉjo, MB kaj Mia

Propono de Roĉjo:

"La Komitato ŝanĝas la punkton 12.2 de la Komitata Reglamento per aldoni "La Voĉdona Komisiono povas deklari, ke estas evidenta plimulto pore aŭ kontraŭe, krom se iu ajn partoprenanto kontraŭas tion." (evidenta plimulto)

22 por, 2 kontraŭ, 1 sindeteno → Akceptita

Propono de Roĉjo:

"La Komitato ŝanĝas en punkto 11.6.3 de la Komitata Reglamenta "Paŭzi dum dek minutoj" al "Paŭzi dum unu, kvin aŭ dek minutoj"." (paŭzo)

10 por, 9 kontraŭ, 7 sindetenoj → Ne akceptita

Procedura propono paŭzi dum 10 minutoj:

Evidenta plimulto → Akceptita

Propono de MB:

"La Komitato forigas en punkto 13.3 de la Komitata Reglamenta la vorton "regularŝanĝo"."

20 por, 0 kontraŭ, 2 sindetenoj → Akceptita

Propono de MB:

"La Komitato ŝanĝas en punkto 14.4 de la Komitata Reglamenta "due por la Vicprezidanto(j), trie por la Ĝenerala Sekretario kaj kvare por la Kasisto" al "due por la Kasisto, trie por la Ĝenerala Sekretario kaj kvare por la Vicprezidanto(j)"."

18 por, 1 kontraŭ, 4 sindetenoj → Akceptita

Procedura propono de Roĉjo ĉesigi la diskuton kaj iri al la sekva punkto

Evidenta plimulto → Akceptita

Punkto (3.B) Aldono de regularo pri intereskonflikto (diskutado kaj voĉdonado)

Interveno fare de Mia ke la regularo ne nepre kongruas kun la reguloj de EVS. Surbaze de tiu interveno Roĉjo retiras la proponon por voĉdoni interrete kiam la teksto kongruos.

Punkto (3.C) Regularo pri kunlaboro TEJO - UEA (diskutado)

Venis komentoj de MB pri la kotizoj kaj Francesco decidas ne voĉdoni por unue amendi la dokumenton.

Punkto (4) Voĉdonado pri Financa Raporto 2017

"La komitato aprobas la Financan Raporton pri 2017"

17 por, 0 kontraŭ, 0 sindetenoj → Akceptita

Punkto (5) Buĝeto 2019

"La komitato aprobas la buĝeton por 2019 kun lingvaj ŝanĝoj."

20 por, 0 kontraŭ, 6 sindetenoj → Akceptita

Punkto (6) Politikaj pozicioj

https://docs.google.com/document/d/1JuBoeLtscvgUmKh00qxJ_1Qs0S-GroRSfM-l45uxYol/edit?usp=sharing

Sendiskute, "La Komitato akceptas la dokumenton pri TEJO kaj religio."

19 por, 5 kontraŭ, 5 sindetenoj → Akceptita

https://docs.google.com/document/d/1nLhYRprRZJ_zzAggoSacSg3Cd_y6kmd3x01TQZATDss/edit?usp=sharing

Sendiskute, "La komitato akceptas la dokumenton pri TEJO kaj demokratio."

18 por, 1 kontraŭ, 7 sindetenoj → Akceptita

Komencas diskuto inter pluraj komitatanoj pri la enhavo de la dokumento pri TEJO kaj EU, kiu evidentiĝas, ke ankoraŭ ekzistas fortaj diferencoj de opinioj pri la taŭgeco enkonduki tiajn pli specifajn poziciojn.

Procedura propono de MB tuj voĉdoni pri la dokumento pri TEJO kaj EU

Evidenta plimulto → Akceptita

"La Komitato akceptas la dokumenton pri TEJO, eŭropa identeco kaj estonteco de EU."

7 por, 10 kontraŭ, 9 sindetenoj → Malakceptita

Punkto (7) Realigplano 2018/2019

Venas demando pri la merkataka buĝeto. Arturo faras prezentaĵon senditan al la komitata listo. La prezentaĵo enhavas klarigojn pri liaj merkatakaj planoj kadre de TEJO kun mencio de aliaj planoj kunlabore kun Enric Baltasar. La prezentaĵo ankaŭ enhavas buĝeton, kiu tamen ne kongruas kun tiu, kiu estas en la oficiala buĝeto de TEJO por 2019. Arturo komentas, ke tio estas nur ekzemplo. Arturo proponas uzi reklamojn en Google, Facebook k.s. por allogi novajn membrojn komentante, ke tion ili faras kun granda sukceso en Kolombio.

Procedura propono plilongigi la sesion ĝis 14:10.

Evidenta plimulto → Akceptita

"La Komitato aldonas al la sekcio D de la proponata realigplano 2018/19 punktojn "Sendi KODEJO-n al landaj sekcioj" kun limdato januaro, "Relanĉi retlistojn por prezidantoj, kasistoj kaj sekretarioj de landaj sekcioj" kun limdato februaro, "Ĝisdatigi liston de aktiveco de landaj sekcioj" kun limdato marto, "Oferti printeban ilaron por organizi lokajn kunvenojn" kun limdato majo, "Trove partnerajn sekciojn por malfortaj landoj" kun limdato junio, "Teni kontaktojn kun grupoj en landoj sen landa sekcio" kun limdato Tra la jaro, "Kolekti informojn pri renkontiĝoj kaj aktive varbi ilin" kun limdato Tra la jaro."

Evidenta plimulto → Akceptita

Post demandoj pri manko de realigplana punkto pri trovado de respondeculoj de kontinentaj komisionoj, la Ĝenerala Sekretario klarigas ke ekzistas jam nun ĉefkomisiito, Querino Neto, kaj konsilas lasi iom da tempo al la nova ĉefkomisiito por analizi la situacion antaŭ devige enkonduki aliajn kunlaborantojn.

Sekve:

"La Komitato ŝanĝas en la proponata realigplano 2018/19 la punkton pri kontinentaj komisionoj al "Trove kaj kunordigadi respondeculojn de kontinentaj komisionoj"."

6 por, 9 kontraŭ, 9 sindetenoj → Malakceptita

Procedura propono daŭrigi la kunsidon ĝis 14:20

Evidenta plimulto → Akceptita

"La Komitato aldonas al la sekcio D de la proponata realigplano 2018/19 punkton "Okazigi voĉdonon pri komitatano C" kun limdato februaro."

9 por, 7 kontraŭ, 8 sindetenoj → Akceptita

"La Komitato aldonas al la sekcio D de la proponata realigplano 2018/19 punkton "Okazigi voĉdonon pri komitatano C" kun limdato marto."

9 por, 7 kontraŭ, 8 sindetenoj → Akceptita

La Ĝenerala Sekretario kaj aliaj komitatanoj substrekas, ke okazigo de la voĉdono pri Komitatano Ĉ enhavas specifajn leĝajn kaj teknikajn defiojn. Tiucele, Hans estas taskitaverki retpoŝton kiu taŭgos kun la eŭropaj ĜDPR-gvidlinioj.

Procedura propono plilongigi la sesion ĝis 14:25

Evidenta plimulto → Akceptita

Post demandoj, la estraranoj klarigas la bezonon eduki siajn aktivulojn en pluraj lingvoj kaj profiti je denaskuloj por plibonigi la lingvokapablojn de la juna esperantistaro.

Sekve, Roĉjo proponas, post nova vortumo de Hans:

"La Komitato ŝanĝas en la proponata realigplano 2018/19 la punkton pri paroligaj kursetoj al "Okazigo de paroligaj lingvaj atelieroj pri diversaj naciaj lingvoj en Esperanto dum Esperanto-kongresoj"

17 por, 6 kontraŭ, 1 sindeteno → Akceptita

"La Komitato akceptas la proponatan realigplanon 2018/19 kun la faritaj amendoj."

24 por, 0 kontraŭ, 0 sindetenoj → Akceptita

3a sesio	lunde, 15a-17a	2 horoj
----------	----------------	---------

Luis malfermas la trian sesion.

Ĉeestas el la estraro: Léon, Tuŝka, Feliĉa, Olga, Hans, Arturo.

Aldoniĝas kiel anstataŭa(n)toj:

- VEJO nome de Rakoen
- KOLOMBEJO nome de Nico
- EUROKKA nome de Nico
- KEJ nome de Roĉjo

La Ĝenerala Sekretario rimarkas, ke 2 el la nomumoj alvenis en neklara maniero kiel respondo al peto nomumi anstataŭanton ekde la unua sesio. Tiucele, estonta proponita vortumado estos laŭ eble: "La Komitatano A transdonas al NOMO mian voĉon por la Komitatkunsido dum Aranĝo D ekde la Sesio 123456789". La nomumoj estas akceptitaj, la kvorumo rekalkulita, kaj korektaj konfirmaj mesaĝoj senditaj al la koncernaj anstataŭatoj.

Propono de Roĉjo:

"La Komitato aldonas al la tagordo punkton pri eksigo de estrarano pri merkatiĝo je la komenco de la tria sesio."

17 por, 9 kontraŭ, 4 sindetenoj → Ne akceptita

Tagordero pri datumpolitiko ne povas bedaŭrinde okazi pro la malĉeesto de Francesco.

Propono de Léon:

"La Komitato petas raporton de Francesco Maurelli pri la datumpolitiko de TEJO ĝis la 20-a de januaro."

30 por, 0 kontraŭ, 0 sindetenoj → Akceptita

Venis punkto (3) Ceteraĵoj. Roĉjo proponas eksigon de Arturo. Komenciĝas diskuto pri taŭgeco de la konversacio kaj voĉdonado en la sekcio "Ceteraĵoj". Ne estas trovitaj problemoj en la Reglamente.

Procedura propono de MB:

"La komitato decidas fari retan voĉdonadon pri la eksigo de Arturo Crespo unu semajnon post la komitatkunveno"

7 por, 11 kontraŭ, 12 sindetenoj → Ne akceptita

Propono de Roĉjo:

"La komitato eksigas la estraranon Arturo Crespo."

11 por, 6 kontraŭ, 4 sindetenoj, 1 nevalida → Akceptita

Komento de Hans, ke la komitato igu Arturon komisiito pri merkatico kiel promesis Roĉjo nome de la Komitato.

"La Komitato nomumas Arturon Crespon kiel komisiiton pri merkatico, kaj donas ĝis la 15-a de januaro por akcepti aŭ ne akcepti la nomumon."

24 por, 0 kontraŭ, 3 sindetenoj → Akceptita

Procedura propono de Léon paŭzi dum dek minutoj por trankviligi la emocian etoson de la komitata kunveno.

Evidenta plimulto → Akceptita

"La komitato plilongigas la trian sesion ĝis 17:30"

Evidenta plimulto → Akceptita

Procedura propono de Tuŝka pri dekminuta paŭzo por interbabili inter estraranoj pri la reglamento kaj la taŭgeco de la elekto en "Ceteraĵoj".

Evidenta plimulto → Akceptita

La estraro, post plia analizo de la Reglamento, konfirmas la ĝustecon de la proceduro laŭ la nuna Reglamento.

Procedura propono de Veronika plilongigi la sesion ĝis 17:40

Evidenta plimulto → Akceptita

Propono de MB:

"La Komitato taskas la Elektan Komisionon krei malferman alvokon ĝis la 3-a de januaro kun limdato je la 13-a de januaro por nova estrarano, kaj la Estraron ĝis la 20-a de januaro malfermi retan voĉdonon inter la kandidatoj."

20 por, 5 kontraŭ, 2 sindetenoj → Akceptita

Procedura propono de Veronika plilongigi la sesion ĝis 18:00

Evidenta plimulto → Akceptita

Propono de MB, enkonduki malferman alvokon laŭ la vortumo "kun prefero por sudamerikaj kandidatoj" estas **rifuzita** de la Ĝenerala Sekretario laŭ la Ĉapitro 2, §5.1 "TEJO kontraŭas diskriminacion rilate al nacieco, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno kaj lingvo" de la Statuto de TEJO. Sekve, la Komitato ne voĉdonas la proponon kaj prenas tempon por revortumi ĝin.

Propono de MB, vortumita de Hans:

“La Komitato en la malferma alvoko por la vaka posteno en la estraro forte bonvenigas kiel kandidatojn sudamerikanojn pro ĝia deziro havi geografian ekvilibron.”

18 por, 4 kontraŭ, 4 sindetenoj → Akceptita

Komuna fotado kaj fermo de la kunsido.